



ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha XIX/7 - 7075. — Redaktas Dr Stanislav Kamarýt.

Ideové školení esperantských pracovníků

Socialismus není myslitelný bez plánování. V kolika obměnách byla tato pravda řečená. A není pro socialistu radostnějšího a útěšnějšího zjištění, než když vidí, jak prozíravě, odborně a systematicky naše veřejná správa plánuje i organizaci lidové osvěty. Plánování v tomto oboru bylo potřeba také pro nás. Naši funkcionáři i naši členové jsou v častém styku s cizinci, i když zatím ne vždy osobním, tedy určitě písemně. Je třeba, aby pokrokové ideje, na nichž spočívá theorie a praxe naší vlády a správy, byly jim zcela jasné a aby se staly integrující složkou jejich myšlení i jejich výrazových prostředků.

Proto jsme uvítali s uspokojením, že ministerstvo informací uspořádalo pro naše pracovníky zvláštní ideové školení, jež se konalo v Praze ve Slovanském domě 14.—18. prosince. Účastnilo se ho 210 našich činovníků, po deseti z 19 českých krajů a členové našeho ústředního výboru. Přednášelo se denně od 8 do 13 nebo 14 hodin. Referáty měli vynikající odborníci, za jejichž vyslání nemůžeme VI. odboru ministerstva školství býti dosti vděční.

Technickým uspořádáním semináře byl pověřen náš Ústav esperantské služby a jeho předseda A. Malík, který se svými spolupracovníky vše připravil.

Předneseny byly tyto referáty:

15. prosince:

- A. Malík: Esperanto na nové cestě.
- O. Vojáčková: Žena spolubudovatelkou socialismu v ČSR.
- C. Herich: Cestovní ruch, náš neviditelný export.
- J. Raňčák: Umělecké památky ČSR.
- J. Stýblo: Odborové hnutí ČSR.
- P. Konečný: Cesta politického vývoje ČSR.

16. prosince:

- J. Jedlička: Sociální politika lidové demokracie.
- M. Čapek: Západ a východ v naší diskusi.
- D. Chalupa: Přehled literatury nové ČSR.
- J. Hlaváček: Cesta výtvarného umění v novém Československu.

17. prosince:

- Dr Houska: Ústava a právní řád.
- F. Richter: Co neví cizina o prezidentu Klementu Gottwaldovi.
- Ing. Zatloukal: Nová zemědělská politika ČSR.
- Jos. Moravec: Organizace čs. družstevnictví.
- Dr P. Levit: Krajské zřízení, úkoly národních výborů.

18. prosince:

- J. Lux: Mládež u nás a v cizině.
- Ing. Novák: Vliv znárodnění na hospodářství v ČSR.
- P. Konečný: Kulturní politika nového Československa.
- A. Malík: Jak se chovat k cizincům doma a v zahraničí; kterak propagovat ČSR esperantem.
- J. Syrovátka: Spolupráce českosl. esperantistů s osvětovými radami.

Po referátech byly vždy dotazy a diskuse, jež dosvědčovaly jak pozornost účastníků tak jejich velmi dobrou úroveň. Účast členů semináře i jejich pozornost byly až do konce velmi dobré. Předsedající s. Malík řídil zasedání i diskusi s velkou pozorností k oběma cílům, esperantu i školení. V případě potřeby ho zastupoval s. J. Vítek.

Referáty samy byly na vysoké úrovni. Byly odborné a populární zároveň. Ministerstvo zaslouží vřelý dík za tak znamenitý výběr řečníků, jež na náš seminář vyslalo. Potlesk po referátech byl spontánní a radostný. Program byl přesně dodržován, jen v poledne se nekončilo podle hodin; diskuse se protáhly tak, že každý den se končilo o hodinu později. Také tato maličkost ilustruje spontánnost zájmu posluchačů.

Po skončení přednášek poděkoval předsedající ministerstvu, jež seminář umožnilo, přednášejícím a posluchačům, shrnul poučení ze semináře a navrhl resoluci, kterou svaz žádá, aby byl přiřazen pod dozor VII. odboru ministerstva informací. Panu prezidentovi republiky, ministerskému předsedovi a ministru informací byly poslány pozdravné telegramy. O školení byla vydána vysvědčení. Ta budou dokladem k žádosti

o pas a povolení cesty do ciziny na esperantské sjezdy a konference.

Též odpolední programy byly velmi dobré úrovně a doplňovaly cíl semináře. Ve středu byla prohlídka Hradu s výkladem p. J. Raňáka, ve čtvrtek moderní umění v Národní galerii a návštěva v rozhlasu. Ve čtvrtek večer byla společná návštěva filmu Osvětím, v pátek dramatu Dina Mühlheimová, v sobotu opery Káta Kabanová.

Z aktuálního materiálu v časopisech, jež byly účastníkům školení věnovány, upozorňuji zvláště na »Povinná témata občanské nauky pro veřejné Lidové osvětové školy 1948/49« v Hlasu osvěty, čís. 14, str. 12. Je tam uvedeno mnoho znamenitých pramenů k obecnému i podrobnějšímu poučení o současných otázkách a hlediskách. Myslím, že mnoho z uvedených statí, zvláště, co je citováno z Tvorby, by měl pozorně pročísti každý, kdo je nebo bude v písemném nebo ústním styku s cizincem.

Ve středu večer byl ve velkém sále Slovanského domu slavnostní umělecký večer k výročí

Zamenhofových narozenin, v úterý večer a v pátek odpoledne byly dvě pracovní schůze, věnované našim organizačním otázkám. O tom referujeme v esperantské části listu.

Také technické uspořádání semináře bylo velmi dobré. Ubytování v hotelích i stravování všeobecně uspokojovalo. Dík zaslouží jak ministerstvo, jež podnik umožnilo příspěvkem na výlohy, tak pořadatelé Ústavu esperantské služby, jmenovitě samideáni Malik, Baldová, Balda a Vitek. Spokojenost všech účastníků znamená však též povinnost: Všichni necht' dbají, aby poučení, jež získali na kursu, nezůstalo u nich neplodné jako zakopaná hřivna, ale ať je to hodnota živá, kterou předají všem ostatním samideánům. Účast na tomto semináři zavazuje zvláště k práci pro naši lidově demokratickou republiku. Tu vykonáme všichni nejen mezi sebou, ale hlavně ve styku s cizinci, které můžeme a máme získávat pro ideály socialistické. To je naše velká povinnost, kterou nám ideový seminář podstatně usnadnil. První podmínka umění přesvědčovatí je vědět. Proto jsme ministerstvu, jež školení uspořádalo, tak upřímně vděční. Stan. Kamarýt

Ramón Maria del Valle Inclán: Partizana ĉefo

Pri tiu maljuna kaj silentema muelisto, kiu gvidis min por viziti la keltajn ŝtonojn de la monto Rouriz, mi konservas memoron duran, fridan kaj tranĉantan, kiel la neĝo, kiu kronis la montsuprojn. Eble pli ol liaj vizaĝaj trajtoj, kiuj ŝajnis ĉizitaj sur durega granito, estis lia tragika historio, kio kaŭzis, ke tiel vive restadu en mia memoro lia tabakeca vizaĝo, kiu apenaŭ distingigis disde la drapo de lia montĉapo. Se mi fermas la okulojn, mi kredas lin vidi. Li estis tubera, seka kaj forta, kiel jarcenta trunko de vito. La grizaj kaj nanaj tufoj de lia barbo memorigis la muskajn makulojn, kiujn montras en la kavoj de siaj vangostoj la statuoj de la klostroj ruiniĝintaj. Liaj korkecaj lipoj sulkiĝis kun severa indiferento. Li havis profilon senmovan kaj penseman senespriman kapon de egipta reliefo. Ne, neniam mi forgesos lin!

Antaŭe li estis terura partizano. Dum la dua civila milito li fuĝis en la montojn kun siaj kvin filoj, kaj en la daŭro de kvin tagoj li sukcesis formi grupon el militharditaj homoj, kiuj estis pretaj eklukti. Kelkfoje li komisiis la komandon de la grupo al sia filo Juan Maria kaj sin profundigis en la montaron, sekura, kiel lupoj, kiu havas en ĝi sian kuŝejon. Kiam oni lin malplej atendis, li reaperis portanta surŝultre sian pafilon plenan de ligaj kaj riparaj aldonoj, kaj kun iu vilaĝa junulo, aspektanta maldiskreta kaj timema, kiu, volonte aŭ ne, venis pligrandigi la grupajn vicojn. Ĉe iro kaj reveno li kutimis viziti la muelejojn por scii pri la farto de la familianoj, kiuj estis la genepoj, kaj informi kiel statis la mueleŝtonoj. Iun vesperan posttagmezon li iris kaj trovis ĉion en malordo. Ligita al fosto de la vinberujo, la muelistino lamentadis kaj vokadis senrezulte siajn genepojn, forkurintajn al la

vilaĝo. La ĉashundo ululis kun difektita piedo pendanta. La pordo estis frakasita per kolbobotoj kaj la greno kaj la faruno tapiŝis la plankon. Sur la knedujo ankoraŭ estis videblaj restajoj de la interrompita tagmanĝo kaj en la stalo troviĝis la malnova kaŝtanuja kofro, traserĉita kaj frakasita... La partizana ĉefo rigardis tioman ruiniĝon sen eldiro de lamento. Post bona informiĝo li aliris sian edzinon, murmurante per tiu sia sentona kaj ĥaosa voĉo de surda maljunulo:

— Ĉu venis la damninduloj?

— Ili sin vidu torturtrenataj!

— Je kioma horo ili venis?

— Je la tagmanĝa horo, ĉirkaŭe. Tiom mi ekscitiĝis, ke mia memoro forviŝiĝas.

— Kiom da ili estis? Kion vi diris al ili?

La muelistino duonploris pli laŭte. Anstataŭ respondi, ŝi ege ekinsultis la malbonajn malamikojn, kiuj tiel grandan frakason estigis en domo de malriĉulo, kiu neniu ĝenis. La edzo rigardis ŝin per siaj kuprocoloraj okuloj de malfidema galiciano:

— Ve, demono! Vi ne estas tiu ruza damnindulino, kiu min trompos! Vi diris al ili, kie sin kaŝas la partizangrupo.

Ŝi daŭre ploradis senkonsola:

— Rimarku, vi, kiel tiuj jerusalemaj ekzekutistoj min postlasis! Ligita same kiel Nia Sinjoro!

La partizano rediris, swingante furioze sian pafilon:

— Nu, respondu, fiulino! Kion vi diris al ili?

— Sed konsideru, edzo!

Ŝi silentis eligante spiron, sen kuraĝo por daŭrigo: tiel imponis al ŝi la sulkiĝita vizaĝo de la maljunulo. Li ne insistis plu; eltiris sian tranĉilon, kaj kiam ŝi kredis, ke li tuj mortigos ŝin, li

tranĉis la ŝnurojn kaj sen diri eĉ vorteton, li ŝin pelis kaj devigis sekvi lin. La muelistino senĉese ploretadis:

— Ve! Filoj de miaj internajoj! Kial mi ne suferis eĉ la fajron de kradrostilo, antaŭ ol perfidi, kie vi troviĝis? Vi, kiuj estas kvazaŭ sunoj, kaj mi, maljunulino, kun piedoj irantaj al la foŝajo. Mi devus dum mil jaroj pilgrimadi vojojn kaj pasejojn por havigi al mi pardonon de Dio. Ve, miaj filoj! Miaj filoj!

La kompatinda virino paŝadis en ega angoro, kun siaj krudaj fingroj de plugistino enretigitaj en la cindrokolora kreskaĵo de siaj haroj. Se ŝi ekhaltis, elŝirante siajn harojn per la manoj kaj ĝemante, la edzo, ĉiufoje pli severmiena, ŝin puŝadis per la kolbo de la pafilo, sed kun delikato, sen kolero, kvazaŭ ŝi estus ege bondresita bovino, naskita en la propra stalo, kiu okaze lamas. Ili ekiris el la draŝejo, varmigata de aŭgustotaga suno, kaj, post traŝiri la herbejojn de Pazo de Melías, ili sin enigis tra profundan vojon de la montaro. La virino ĝemadis:

— Sanktega Virgulino, ne forlasu min dum ĉi tiu okazo!

Ili marŝis sen halto ĝis ili atingis vojkurbiĝon, kie staris altartabulo de mortintaj animoj. La partizana ĉefo surgrimpis palisaron kaj rigardis respekteme, kiom de tie videbliĝis de la vojo. Li streĉis la frapilon de sia pafilo kaj, post sekurigo de la eksplodigilo, li lante faris la kruconsignon, kiel malnova kristano:

— Sabela, surgenuigu vin apud la Altaro de la Benataj Animoj.

La virino obeis tremante. La maljunulo sekigis al si larmon.

— Rekomendu vin al Dio, Sabela.

— Ve, vi, ne mortigu min! Atentu nur ĝis scii, ĉu tiuj juveloj, niaj filoj, ricevis ian malbonon!

La gerilisto ree pasigis la manon sur siaj okuloj; poste li prenis de sia zono la klasikan rozarion el lignaj globetoj interkroĉitaj per orkolora drato kaj ĝin donis al la maljunulino, kiu ĝin ricevis plorante. Li sekurigis sin pli bone sur la palisaro kaj murmuris severe:

— Ĝin benis la sinjoro episkopo de Orense, kun indulĝenco por la morthoro.

Li mem ekpreĝis kun monotona kaj terura flustro, kaj de tempo al tempo jetis maltrankvilan rigardon al la vojo. La muelistino eksereniĝis iom post iom. Sur ŝiaj respektindaj faltoj restis, tremantaj, ŝiaj larmoj. Ŝiaj manoj, skuataj de maljunula tremetado, osciligis la krucon kaj medalojn de la rozario. Ŝi klinis sin frapante sian

bruston kaj kisis la teron kun fervoro. La maljunulo murmuris:

— Ĉu vi jam finis?

Ŝi kunigis siajn manojn kun kristana ekzalto:

— Iĝu, Jesuo, via volo!

Sed kiam ŝi vidis la teruran maljunulon meti la pafilon antaŭ la vizaĝon kaj ekceli, ŝi levigis en ega teruro kaj kuris kontraŭ lin kun la brakoj apertaj:

— Ne mortigu min! Ne mortigu min, pro la animo de...!

Eksonis la pafo kaj ŝi falis meze de la vojo kun la frunto truita. La partizana ĉefo levis de la sangmakulita sablo sian gerilistan rozarion, kisis la bronzan krucifikson kaj sen prokrasto por ŝargo de la pafilo, li fuĝis al la montaro. Li ĵus ekvidis, ĉe la supro de la palisaro, la ŝirmokovritajn tripintajn ĉapojn de la civilgardistoj.

El la hispana tradukis Juan Régulo Pérez (Karnariaj Insuloj).

Postnoto. — Ramón María del Valle Inclán (1869—1936) estas fama hispana verkisto, granda lingvoartisto kaj elstara demokrato. Liaj verkoj estas legataj ĉiufoje kun pli granda ŝato. Dumvive li estis respublikano kaj kontribuis al la renversigo de la hispana monarĥio kaj starigo de la hispana respubliko. Por sia feliĉo li mortis antaŭ ol militistoj alianco kun la cetera hispana reakciularo kaj helpataj de la internacia faŝismo ekinŝtalis la diktatoran faŝistidan reĝimon en Hispanio.

Valle Inclán specialiĝis je la priskribo de tipoj kaj figuroj de la hispanaj civilaj militoj de la XIXa jarcento. Nun denove ekzistas geriloj sur la hispana teritorio. Eble tiu supra rakonto montras pli verve la spiriton de la plej bona Hispanio, ol iu ajn alia. Ankorau hodiaŭ multaj vere religiaj homoj — eĉ se multaj el tiuj sentoj estas krudaj kaj primitivaj — fuĝis en la montarojn, precipe en Basklando, por lukte defendi sian liberon. Plinombas tamen la alitendencaj ribelintoj. Ĉe la „ebenajo“ restis nur la pruduloj kaj flatantoj, la profitistoj kaj fiŝistoj en ĉiuj akvoj...

Al la idealistoj kaj demokratoj, kiuj devis rifuĝi en montarojn aŭ propravole ekziliĝi; al la sennombraj, kiuj mortis kaj mortaĉadas en karceroj kaj koncentrejoj, ĉi tiu rakonto, kiu respegulas la sintenon de tipa ribelinto, estu klara monstro, ke oni ne povas subigi popolon, kiu scias partizani kaj gerili heroe... Valle Inclán ĉiam skurĝis prudulojn kaj profitistojn kaj ekzaltis la amon al la libero, la individuismo kaj la sendependecon de la hispana spirito. Se Valle Inclán estus vivanta, kiel lia potenco verve estus priskribanta la nunajn partizanojn! Kaj kiel li estus vipe mordinta la politikajn spekulistojn kaj friponojn!

Vortklarigo:

civilgardio — Hispana armita institucio, kies tasko estas prizorgi la ordon inter civiluloj. Ĝin misfamigis ĝiaj krudaj kaj tre ofte kruelaj agoj, inter kiuj troviĝas la murdo de la granda demokrata poeto Federico García Lorca.

Galicio — Nordokcidenta regiono de Hispanio, kies loĝantoj estas proverbe malfidemaj.

gerilo — Partizana, embuska milito.

(J. R. P.)

Ĉlenské přispěvky 1949: Doporučení pracovní schůze 14. 12. m. r. o zvýšení členských příspěvků nebylo možno provést, neboť inkaso příspěvků 1949 bylo již tehdy u většiny klubů v proudu dle dosa-
vadních sazeb. Ponecháváme proto prozatím vyšší příspěvků nezmě-
něnu a k této otázce, též ve spojitosti s všeobecnou daní, se vrá-
tíme k valné hromadě.

Základní členský příspěvek je tedy prozatím Kčs 70,— za kalen-
dátní rok, pro studenty (učně) a vojáky v pres. službě Kčs 40,—,
pro rodinné členy Kčs 20,—, předplatné v tuzemsku jest Kčs 80,—,
ne adresu do ciziny Kčs 50,—. Maximální sleva pro kluby, pouze
u základního příspěvku, jest Kčs 15,—.

Legitimaace: Omluvte nás laskavě, jestliže nám pro začátek roku
není možno dodržet tříměsíční lhůtu od zaplacení příspěvku 1949
(resp. od 1. 1. 1949) k odeslání legitimaace novému členu.

Starí členové, kteří mají již legitimaace pro rok 1948, prodlouží
její platnost vlepěním příspěvkové známky, kterou si každý sám
vystřihne z příštího čísla tohoto ročníku. Příští číslo zašleme proto

pouze těm, kdo nám do 15. 2. poukázali členský příspěvek 1949.

Složenky: K celému nákladu přikládáme znovu složenky a pro-
stíme, aby je použili k úhradě členského příspěvku co nejdříve vši-
chni ti, kdo příspěvek dosud nepoukázali. Ostatní necht' již laskavě
uschovávají pro případnou příští potřebu.

Slovníková příloha: K dnešnímu číslu přikládáme další stránky
slovníkové přílohy pouze těm, kdo si její zaslání předplatili. Nové
příplatky již nepřijímáme, jelikož celé dílo bude v dohledné době
vydáno knižně. Prosíme všechny ty, kdo se k odeběru přílohy při-
hlásili později, kdy již první archy byly rozebrány, a kterým tedy
chybí některá část slovníku, aby se pro kontrolu přihlásili tím
způsobem, že nám na složence, kterou budou platit členský příspě-
vek 1949, uvedou chybějící strany. Pokud máte již příspěvek vy-
rovnán, nebo jej zaplatíte prostřednictvím místního spolku, po-
užijte také dnes vložené složenky, na kterou vpišete čísla chyběj-
jících vám stran (bez jakéhokoliv dalšího sdělení) a zašlete nám
ji zpět jako tiskopis (80 h) v obálce, na které uvedete zpáteč. adresu.

KRONIKO ENLANDA

Ĉeĥoslovaka respubliko volas ebligi al talentaj manlaboristoj universitatajn studojn, ankaŭ la studon de medicina scienco. Tiucele estus necese havigi al tiuj laboristoj almenaŭ partan scion de la latina lingvo, por ke ili povu uzi medicinajn fakesprimojn, kiuj plejparte estas latinaj.

La dekano de medicina fakultato en la universitato en Olomouc, prof. Dro Fr. Lédl, esprimis tiurilate sian opinion al redaktoro de la tagĵurnalo „Stráž lidu“ jene:

„Latinon povus anstataŭi Esperanto, kiu transprenis la plejparton de vortradikoj el la latina. Cetere estus utile, ke ĉi tiu tre facila internacia helplingvo estu enkondukita en la lernejojn de la II-a kaj III-a grado. Certe ĝi estus pli bona fundamento por la studo de fremdlingvoj ol la latina — ĝi havas multe pli grandan vortrezoron ol povas doni okjara studo de la latina — kaj samtempe ĝi konigas al studentoj ĝustan signifon de internaciaj vortoj, kiujn ĝi enhavas.“ (Dianto)

Vizitu Ĉeĥoslovakion, landon de naturaj belajoj, mineral-kaj sanigintoj - invitas duobla poŝtkarto, eldonita de la Asocia Instituto de Esperanto-Servo (Praha II, Malá Štěpánská 7). Krom po unu bildo el Karlovy Vary kaj Altaj Tatroj ĝi enhavas multkoloran mapon de la Respubliko, tre bele presitan, sur kiu estas jam skizitaj limoj de novaj administraj regionoj. La poŝtkarto estas tre taŭga por korespondi kun fremdlando. Nepre ĝin mendu ĉe regionaj perantoj aŭ ĉe nia Librovendejo, 10 ekz. aŭfrankite por 20 Kčs.

Praha, faldebla prospekto dek-paĝa, eldonita de la Estraro de la Centra Nacia Komitato de la ĉefurbo, fako propaganda, estas presaĵo tre bela. Ok bildoj redonas tre sugestive vidaĵojn vidindajn. Ankaŭ la teksto estas tre taŭga, bedaŭrinde la traduko ne estas bona, ofte ĝi estas ne sufiĉe eleganta, iam enestas eraroj. Sur la lasta paĝo ekz. „apartigito“ ne estas departemento aŭ fako. Ankaŭ neniu leterportisto trovas laŭ „komunuma domo“ la popularan Obecní dům u Prašné brány. La teksto sub la ruinoj de la Urbodomo estas nepre erariga. Kial la nekonata tradukinto ne pet's nian Lingvan Komisionon pri konsilo? Senpage ricevebla por fremdlandanoj ĉe Cizinecký svaz, Praha I, Obecní dům u Prašné brány.

Ekzamena komisiono kunsidis la 6-an de Novembro 1948 en Praha en la Asocia oficejo por ekzameni kandidatojn, kiuj ne povis veni al kunsido en Doksy. Ekzamena senato konsistis el Dr Stan. Kamarýt, Dr T. Pumpr, Dr A. Pitlík, O. Ginz, Rud. Hromada. Prezintis sin 4 kandidatoj, por Ekzameno pri kapabeleco instrui Esperanton en lernejoj kaj kursoj kaj ĉiuj ricevis la diplomon (en krampo estis temo de la hejma tasko):

MUDr Josef Černý, kuracisto en Litoměřice (Progreso de la medicino dum la mondmilito 1939—1945).

Karel Mucha, studento en Chomutov (La ĉeĥa revolucio en la jaro 1848).

Adolf Staňura, kalkuloficisto en Gasfabriko en Ostrava (Alfaro de stenografiaj sistemoj por Esperanto).

Pavel Štastný, studento en Košťálov (Traduko de ĉeĥaj idiotismoj).

Estis donitaj du notoj „eminente kapabla“ kaj du „kapabla“.

La ekzamenitoj akceptu krom gratulo dankon pro sia sindediĉo al studoj de esperant-lingvaj problemoj.

„La plej eta postsigno“, detektivkomedio de Ed. Fikar en traduko de Slanina kaj Nývlt, estis prezentita de la Verda Stacio la 6-an de Decembro. Reĝisoris Dal. Chalupa. Meritas laŭdon la eltrovemo de s-o Slanina, kiu scias atingi, ke la programoj estu diversaj.

Koncerto por memori la 89-an naskiĝtagon de Zamenhof la 15-an de Decembro en salonego de Slava Domo en Praha, aranĝita de Esperantista Klubo okaze de la Ideologia kurso por esperantistoj, estis travivaĵo rava. Prezintis la artistan programon aktoroj de la Verda stacio. Tio jam garantiis altan nivelon de la prezentadoj. Enkonduke prezidanto de la Klubo Jar, ŝustr havis tre bonan ĉeflingvan preleĝon pri Zamenhof, poste sekvis vico de prezentadoj, inter kiuj estas malfacile signi la plej belajn, ĉar ĉiuj eminentis. Profesorino Marie Knotková ludis virtuoze per piano siajn unutetojn Preludion de Rachmanin, valsojn de Smetana, fantaziojn laŭ popol-kantoj kaj kun la sama virtuozece akompanis operokan-

tistino Věra Jindřichová, prezentantan la Solveige-kanton kaj arion de Rosalinda el Rossini-opero per ekzercita voĉo argenta. Josef Bartoš tenoristo de Ĉs Radio kantis ĉefajn kantojn kun arto ne ĉiam aŭdata, Zdeňka Procházková, membrino de la Teatra kaj Filma Studio, deklamis esperantlingve „Ho mia kor“ kaj Pumpr-tradukon de la „Fianĉino“ de Neruda; la versoj similis kanton en ŝia deklamo. Eva Nývltová dancis Valse Lento-fablo de Bohuslav Leopold ludita plane de Josef Doubravský; la knabina korpo vibris kaj la tuta halo kvazaŭ sentus sin senigita de sia korpeco, kvazaŭ rigardus kaj aŭskultus nur animoj puraj, malplipezaj, senkorpaj; mi dirus, ke dancoarto estas la plej nobla inter la artoj, se ĝi estas belarto efektiva. Karel Höger, aktoro de la Nacia Teatro, prezentis monologon de Janošík el la VII-a sceno de la tria akto de la Mahen-tragedio en Esperanto-traduko de A. Slanina. Kaj Zdeňka Švabíková kun K. Höger prezentis dialogon de Mahulena kaj Radúz el la 4-a akto de la dramo de Zeyer ankaŭ en la traduko de Slanina. Deklamo de tiuj tekstoj estis tiom bona, ke ĝi estis kortuŝa. Unufoje pli estis pruvite, kiom bone estas kompreneblaj eĉ subtilaĵoj de komplikaj tekstoj deklamataj de bona deklamanto. La ambaŭ aktoroj akceptu gratulon varman pro tiu sia sindediĉo al esperantlingva deklamado.

Reĝisoro de la vespero estis Antonín Slanina, kiu parolis enkondukan parolon kaj prezentadis la unuopajn programojn. Li ne meritas esti forgesita. Lia personeco estis ligilo de la programo, lia rideto pensema kaj pensiga kreis etoson de la vespero. Dua viro, kiu ne rajtas esti nenomita, estas piano-artisto Josef Doubravský, kiu akompanis kantojn kaj dancon. Li aŭdigis muzikon tre aŭskultindan; li certe ne estas nura muzkisto, sed efektiva muzikulo. Li ja estas esperplena komponisto.

Al la koncerto estis invitata ankaŭ ne-esperantista publiko, kiu venis. Por ĝi ricevis la ĉeestantoj ĉefajn tekstojn de la esperantlingvaj programoj. Rememori pri tiu ĉi vespero estos edificanta penso dum longa tempo.

Du Asociaj laborkunvenoĵoj dum la ideologia seminario okazis mardon je la 14-an de Dec. je la 20-a horo kaj vendredon la 17-an je la 14.30—18.00 horo en la Slava Domo. Ĉeestis preskaŭ ĉiuj partoprenantoj de la seminario kaj Asociaj komitatoj. Prezidis ambaŭ kunvenoĵoj s-o Adolf Malik, ĉefa raportanto estis vicprez. Rudolf Hromada. Oni preparolis ĉiujn aktualajn taskojn kaj problemojn de nia organizo kaj oni aŭdis diversajn tre utilajn sugestojn, kiujn komitato esploras kaj efektiviĝos laŭ ebleco. La ĉefaj rekomendoj kaj informoj aktualaj estas:

Plialtigo de la membra kotizo por 1949. Ĝi estas nepre bezona, ĉar ni bezonas pluan oficiston en la oficejo apud s-o Balda, kies laboro estas tre valora kaj kiu plenumas ĝin kun granda sindediĉo. Sed estas bezone havi pluan laboranton por administrado de la membroj kaj por librotenado. La taskoj de nia honora librotenanto Jiří Hromada tiom kreskis, ke ne plu oni povas postuli tiom da tempo-fero. La kunveno ĉiesvoĉe kontraŭ unu decidis rekomendi por j. 1949 kotizon Kčs 100.—

Bonvolu legi la ĉeflingvan sciigon sur la paĝo 3 de tiu ĉi numero!

Nia organo tre bezonus denove siajn 12 paĝojn. Por povi apogi nian peton, ni tre petas samideanojn organizi kolektadon de malnova papero. Konfirmojn, ke vi transdonis ĝin al la loka kolektisto, sendu al nia komitato. Partopreni en tiu kolektado estas ja civitana devo, plenumante ĝin vi samtempe servos al via revuo.

Librojn el fremdlando ni provizore ne povas liveri, ĉar ne estas eble ricevi permeson pagi fremdlandan. Nek kotizojn por UEA ni povas transsendi laŭ la nuna situacio. Pri ĉio, kio estas aŭ estos abonebla, ni informas en la gazeto. Se sukcesos traktado de nia Librovendejo, pri kiu laboras s-o Ginz, la afero solviĝos tre kontentige. S-o Ginz akceptu apartan dankon pro sia sindediĉo al tiu ĉi tre grava agadsfero.

Eldono de la Konstitucio kaj aperado de la Esperanto-Servo estas faro ekstrema grava. Nepre ĉiu zorgu, ke neniu ekzemplero restu ĉe vi, sed venu en fremdlandon. Zorge notu ĉiujn adresojn, kien Vi ilin sendis por povi al ni aŭ la Informministerio raportu. Konservu ĉiujn respondojn kaj kritikojn, kiuj venis de la ricevintoj.

Statistiko de membroj (estas da ili 3020) laŭ lokoj, kiun fariĝis kaj prezentis R. Hromada, vidigas, ke malgraŭ tiu relative granda nombro ni ne havas membrojn en iuj gravaj lokoj. Regionaj perantoj ricevos tiujn ciferojn kaj estos ilia tasko, ke la movado ekestu ankaŭ en ĉiuj iom gravaj lokoj de ilia regiono.

Funkcio de la Regionaj perantoj enradikiĝis. La kunveno proponis personojn, kun kiuj ni traktu pri vakantaj postenoj. Depost la 1-a de Januaro efektiviĝas nova popola administra reformo per starigo de Regionaj Naciaj Komitatoj. Ni adaptos nian reton de perantoj al tiu ĉi nova sistemo. Kelkaj regionaj perantoj fariĝos distriktaj, sed tio ne malgrandigos iliajn laboreblecojn. La kunveno esprimis dankon al ĉiuj aktivaj regionaj perantoj.

La efektiviĝado de popoldemokratia administro per Regionaj, Distriktaj kaj Lokaj Naciaj Komitatoj donas al nia movado grandajn eblecojn organizajn. Ĉiuj niaj laborantoj enigu sin en tiun sistemon. La kurson organizu proponante sin por instruado al Lokaj kaj Distriktaj Klerigaj Konsilantaroj precipe por Popolaj Klerigaj Lernejoj. La instruanto nepre ricevos honorarion; ĉiu instruanto klopodu instrui laŭ siaj plej bonaj eblecoj kaj dece plenuju sian postenon inter la instruista kolektivo de tiuj lernejoj, kiuj havas ankaŭ sian apartan karakteron progresan. Pri tio precipe insistis prezidanto Malik.

Organizi regionajn konkuradojn, konkuradojn aŭtorajn kaj tradukajn, kursojn en fabrikoj, traduki Jirásek, jen kelkaj el sugestoj diritaj inter pluraj aliaj. Pri ĉiuj traktos la komitato taŭgatempe.

La ambaŭ kunvenoj signifis grandan spiritan apogon por ĉiu nia laboranto, ĉar ili vidigis reciprokan sindonemon samideanan de nia membraro. Antaŭen kamaradoj!

Tre malbonan servon al celo disvastigadi praktikan uzadon de lingvo internacia faras occidentalisto, kiu legas

LINGVO

20. úkol k překladu.

O tom, jak se projeví spolupráce se Sovětským svazem v československém hospodářství v prvním roce pětiletky, pravil předseda vlády: Spojení československého hospodářství s hospodářstvím Sovětského svazu se v prvním roce pětiletky dále upevní a rozšíří. Z celkového československého dovozu připadne na dovoz ze Sovětského svazu plných 20 % a stejně z celkového našeho vývozu bude do SSSR vyvezena asi pětina. Sovětský svaz nám pomáhá dosáhnout vysoké spotřební úrovně ve výživě, zásobí náš průmysl surovinami a polotovary a dodá nám některé důležité investiční statky. Dále zabezpečuje zaměstnanost našeho lehkého průmyslu tím, že odebere značnou část jeho výrobků, které bychom jinak na světových trzích těžko uplatnili, a kterými si vyprodukuje dovozy potřebných surovin ve výhodném poměru. Náš hospodářský styk se Sovětským svazem je velmi výhodný, protože dovážíme 97 % potravin, surovin a polotovarů a jen 3 % hotových výrobků, zatím co vyvážíme 95 % průmyslových výrobků, v tom plných 70 % výrobků průmyslů lehkých.

Překlady prosíme do 20. února.

Úkol 21.

Tentokrát předkládáme k překladu ne souvislý text nýbrž několik rčení se slovesem býti. Anj my neznáme nejlepší překlady předkládaných vět. Prosíme o návrhy, které by vystihovaly kolorit uvedených rčení co možná přesně. Nejde ovšem o překlad doslovný, ale ani ne o rozvláčný popis nebo opis. Překlad takových rčení z jisté nemusí mít stejný počet slov, ale musí býti přece jen také co možná stručný. Není třeba, aby nám každý spolupracovník poslal překlady všechny, budeme mít radost ze zdařilých překladů i když nebudou uvedena všechna rčení. Proto jsou číslována. Prosíme o poslání do 20. února.

nian revuon kaj laŭ adresoj en ĝi trovitaj sendas folieton laŭ formato de niaj UNO-petskriboj, en kiu li asertas, ke occidental estis moderna lingvo internacia, Esperanto malnovmoda kaj ke li laŭ adreso Buro del Interlingue Praha XIX, Zelená 2 donos pluajn informojn. „Ci on dá al persones, quel have real interest in li afere, omni general e special informaciones gratis.“

Nia rapida kresko organiza kaŭzas, ke en nia organo aperas relative multaj adresoj ofte de novaj esperantistoj. Ni ne volas kaŝi ilin antaŭ occidentalistoj. Nia teorio diferencas de occidentalista precipe en tio, ke ni proponas al la mondo lingvon relative tre perfektan, eĉ se ni scias, ke ĝi ne estas perfekta absolute, kaj klopodas daŭre kreadi eblecojn por ĝia praktika aplikado, per kiu la lingvo konstante pliboniĝas. Precipe per aplikado parola kaj skriba uzado. Occidentalistoj pensas, ke la ĉefa tasko por interlingvo estas tuja komprenebleco fare de poligloto okcidentlingva. Sed en tio estas ilia ĉefa eraro. Tiu poligloto la helpan lingvon ja ne bezonas, precipe ne por pasiva kompreno de tekstoj. La ĉefa kaj la plej malfacila tasko estas ja doni helplingvon al homoj, kiuj ne studis nek povis studi fremdajn lingvojn kaj tamen volas kaj bezonas interlingvon por aktiva uzo, do por paroli per ĝi. Por tiu celo la aprioraj elementoj en Esperanto ne estas manko sed avantaĝo. Niaj legantoj tion ja scias kaj ĉiutage spertas. Tial ni ne intencas ŝirmi ilin kontraŭ atakoj occidentalistajn troigojn perdas iam fidon al ideo de la talistaj serĉi siajn adresojn mem per propra laboro. Tamen okazas, ke novaj adeptoj de lingvo internacia legante occidentalistajn troigojn perdas iam fidon al ideo de la helpa lingvo internacia komplete aŭ por longa tempo. Kaj tio estas malutilo por la ideo, por kiu ni kaj occidentalistoj batalas kune. Serĉu ili sendepende novajn adeptojn de nia komuna ideo, kaj ne venenu partianojn jam konvinkitajn aŭ konvinkatajn!

1. Býti na dosah, býti na dostřel.
2. Býti na holičkách.
3. Býti při penězích.
4. Býti o hladu.
5. Býti o chlebě a vodě.
6. Je mi nevolno, na nic, zle.
7. Je mi hanba.
8. Nám není o pár grošů.
9. Je jen o začátek.
10. O nějaký den by nebylo.
11. Všem jest nám umřítí.
12. Bylo jim vstávatí před pátou hodinou.
13. Bylo jí jítí okolo domu.
14. Teď do mužských nic není.
15. Lesu a vodě není co věřítí.
16. Jako by jí po vši té kráse nic nebylo.
17. Láska tolik jest člověku, kolik slunce zemi.

Termínoĵ por nuntempo.

G. Waringhien en recenzo pri „Sveda Laborista Movado“ rekomendas kelkajn aliajn terminojn ol estas tiuj uzitaj en la libreto citita. Mi redonas ilin laŭ la ĉeĥa alfabeto:

aŭtarkie — aŭtarcio ne aŭtarkio (ni preferas aŭtarkio)
decentralisaĉni — malcentraliza, ne decentraliza
nacismus — nazismo, ne naciismo
opracované dřevo — prilaborita ligno, ne rafinita
pokrokový — progressa, ne progresiva. (Ni tre konsentas kun malaprobo de vorto progresiva, kiu nun komencas fantomi ankaŭ en ĉeĥa ĵurnalista lingvo por fari ĝin malpli klara.)

S. K.

Korekto de preseraro, En la III-a jarkolekto sur paĝo 96 en Fervoĵistaj terminoj bonvolu en la lasta linio korekti vŷhybka = traktorko.

NI LEGIS

Pri la Internacia Kongreso de la Intelektuloj en Wrocław, la 25—28-a de Aŭgusto, ni legas bonan raporton de Isaj Dratwer en Internacia Kulturo (9-a numero). El rimarko ni ekscias, ke la Asocio de Esperantistoj en Pollando liveris al ĉiu kongresano informan broŝuron pri la „Moderna Pollando” en Esperanto, preparis informan leteron pri E. en lingvoj angla, franca, rusa kaj Esperanto. Ĝi estis faro tre utila kaj tre imitinda por internaciaj kongresoj.

Ĉe la Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio estas starigata, laŭ decido de ĝia kunveno en Malmö, sekcio de radioredaktoroj kaj radiokunlaborantoj. Gvidas ĝin nia prezidanto A. Malik.

Monda Bonvolservo (1913, Dominion Boulevard Windsor, Ontario, Kanado) esperant-angla-lingva, aperis en Septembro jam 85-an numeron, en kiu ĝi informas pri konstruo de novaj loĝejoj por rifuĝintoj en kolonio de Fratoj-Hutteranoj en Primavera (Alto Paraguay, Sud-Ameriko).

La Aŭstria Esperanto-Kongreso en Linz (12—15-a de Aŭgusto) kunvenigis pli ol 350 kongresanojn. Kongreso ricevis salutojn de multaj aŭtoritatoj, inter ili ŝtata kanceliero dr ing. Figl. Persone salutis la kongreson la landestro de Supera Aŭstrio d-ro Gleisner.

Raporton detalan pri la Budapeŝta konferenco ni legis en Hungara Esperantisto (Jul.-Okt.). Enestas ankaŭ bildo de ministro Rákosi kun Haiderer (aŭstro), Ginz (ĉeĥo), Tvarožek (slovakoj), Vančik (jugoslavo).

La mondlingvo en la praktiko estas listo kompilata en „La praktiko, la gazeto por la mondĉivitanoj”, kiu aperas en grandformataj 24-paĝaj kajeroj en Riouwstraat 172 Den Haag kiel organo de la Universala Ligo. Dum la jaro 1947 ĝi ne aperadis pro neebleco ricevi paperon kaj la UL-membroj ricevis kompenso Heroldon.

Studenta Fronto, Internacia Studenta Gazeto en Esperanto. Eldonata de la Sekretario de Studentaj Esperantistaj Rondoĵoj ĉe Unio de la Popola Junularo, Sofio, Bulgario. Aperis numero 3—4, 16-paĝa kun tre interesa enhavo. Ni enskribu tie ĉi „Ĉina studentaro lukta kontraŭ la murdisto Ĉiang Kajŝek”. Ĝi finas: „Estas antaŭnokto de nova revolucio, kiel diras profesoro Zhou Bingling.”

En Jugoslavio oficiala enketo en la parlamento montras, ke 51 % de la parlamentanoj estas favoraj al enkonduko de Esperanto por internaciaj rilatoj. (Svias Espero, Sept.—Okt. 48).

Franca ministro de instruado M. E. Naegelen pri Esperanto en la franca parlamento. Meritas enskribon lia respondo al petskribo de deputito Amal pri „Enkonduko de Esperanto en la lernejojn”. En sia respondo publikigita en Journal Officiel de la République Française el 21. Aŭg. 1947 represita en esp. traduko en Aŭstria Esperantisto (Aŭg.—Sept. 1948) li redonas ĉiujn esperantistajn argumentojn por helpa lingvo internacia en tre bona kaj konvinka stilo. Sed li ne estas konvinkita pri evidenteco, ke Esperanto estas definitiva solvo. „La sola demando, kiu meritas esti ekzamenata, estas tiu, scii ĉu ekzistas fakte iu lingvo de tiu speco, kiu vere meritas fariĝi la internacia. Por respondi tion necesas sin dediĉi al kritika studado de ĉiuj, kiuj aspiras ĉi tiun titolon. Laŭ mia opinio la vico estas al UNO aŭ UNESCO organizi ĉi tiun enketon. Necesas komisi komitaton de lingvistoj esplori, ĉu iu de helplingvoj aktualaj donas al ni ĉiujn bezonatajn kvalitojn (gramatika simpleco, karaktero de universaleco koncerne la radikojn, sonharmonieco ktp), kaj kiam tia lingvo ne ekzistas, krei novan. En tiu momento, kiam UNO posedos la aŭtoritatecon morale necesan, ĝi povus inviti ĉiujn registarojn por enkonduki Esperanton en la lernejojn.”

60 danaj esperantistoj venis en du aŭtobusoj al Hamburgo, alportante tiom da bonegaj buter-panoj, ke ĉiuj el 150 samideanoj povis satmanĝi. Ankaŭ ovon preskaŭ ĉiu ricevis. Kursestro alvenigis dekon da infanoj, kiuj lernas ĉe li Esperanton. Ili miris pri la luksaj manĝaĵoj, kiujn ili rajtis manĝi. (El „La ĝusta vojo” represas Dansk Esperanto-Blad el Sept. 1948.)

El La Rondo, oficiala organo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (Aŭgusto) ni sciigas, ke en Aŭstralio estas permesite eldoni gazetojn en fremda lingvo nur post aparta permeso de la registaro. La Rondo ricevis tiun permeson

kun kondiĉo, ke ĉefartikolo kaj entute kvarono de la tekstoj estos anglalingvaj.

Esperantlingvan kolonon en ĉiu numero enhavas nederlanda gazeto por propagandi spiritismon Spiritualistische Geloofsgemeenschap (Singel 368 Amsterdam).

„**Ĉeĥoslovaka Antologio**” estis temo de prelego fare de s-ino Sengel la 22-an de Novembro 1948 en kunveno de la Brusela Grupo Esperantista.

Revuo Orienta (Redakcio: Japana Esperanto-Instituto, Tokio, Hongo-Motomati 1—13, Japanujo) enhavas en sia jarkolekto 1947 tradukon de la nova japana konstitucio.

Amikeco por ĉiam de V. Ardamatskij pri la grupo de ĉeĥaj infanoj en Artek (Krimo) estas tradukita el Junák de M. J. en Internacia Kulturo (Aŭgusto).

Informilo de Portugala Esperanto-Ligo, Apartado 125, Lisboa-Norte, aperas ciklostilite ĉiumonate, du-tri paĝoj grandformataj.

Vortoj de Dro Lapenna en Internacia Kulturo pri obstino en nia laborado meritas represon, kiel pruvas ankaŭ ilia cito en La Rondo: „Se oni kun entuziasmo amas la aferon, oni trovas eblecon labori por ĝi eĉ en la plej malbonaj cirkonstancoj. Kelkaj samideanoj gvidis kursojn en la hitleraj koncentrejoj (ekz. Kozlevčar en Dachau). Bulgaraj kaj jugoslavaj partizanoj instruis la Internacian Lingvon al siaj kamaradoj en la montaroj inter du bataloj. En urbeto Livno sur la liberigita teritorio de Jugoslavio okazis en j. 1943 eĉ Esperanto-Kongreseto, dum en la proksimo tondris la malamikaj kanonoj. Multe da similaj ekzemploj oni povas citi el aliaj landoj luktantaj kaj sangantaj por sia libereco.”

Raporto pri prelego esperantlingva de Dro Lapenna en Parizo en Sorbonne pri Konflikto inter Albanio kaj Britio antaŭ la Internacia Kortumo en Hago ni legis en Franca Esperantisto (Jul.—Aŭg.). La raporto estas tre klara kaj tre instrua. La proceso finis per kompromiso pri proceduro, laŭ kiu Britio ne rajtas akuzi Albanion sed ambaŭ ŝtatoj petas la Kortumon decidi: „Ĉu Albanio respondecas pro eksplodoj sur britaj ŝipoj la 22. X. 1946 kaj ĉu Britio respondecas pri invado en albaniajn akvojn la 22. X. kaj 12.—13. XI. 1946.” Tiu ĉi solvo prezentas grandan sukceson de Albanio, kiu defendante sin mem samtempe defendis la principojn de la Carto de la Unuigita Nacioj, organizaĵo, kies pordoj estas al ĝi ankoraŭ ĉiam fermitaj.

Proper Names (propraj nomoj) estas tre detala kaj dokumentita anglalingva studaĵo en The British Esperantist 1948. Ni legas tie proponojn de Esperanto-devenaj baptonomoj ekz. Esperantino, Esperino, Espino, Espero, Esperita... aŭ por viroj Abelo, Aglo, Aprilo, Astro ktp.

En la unua Viena Esperanto-Konferenco la 17—18-an de Aprilo 1948 partoprenis 300. Cifero tre impona. (Aŭstria E-Revuo, Aprilo-Junio, nur en Nov. veninta.)

La estonto esperantista, Oficiala organo de la Junulara sekcio de Germana Esperanto-Asocio en Hanover-L 1. Postfach, aperas regule ĉiumonate po 8 paĝoj. Ĝi jam per tio vidigas viglecon de la movado en Germanio.

Nekrologo pri s-o Votrubeč aperis sur unua paĝo de La Interligilo, Marto-Aprilo 1948, verkita de Petro Filiâtre.

Natura, portugala revuo ilustrita de naturamikoj, aperigadis en ĉiu numero paĝon esperant-lingvan redaktatan de A. Costa Junior, Rua General Taborda, 65, 2. E. Lisboa-H. Sed de post Septembro tio estis malpermesita de la cenzuro.

La kvina datreveno de la ribelo en Varsovia ĝeto. La 19-an de Aprilo 1943 germanoj komencis la plenan likvidon de la Varsovia Ĝeto, Tankoj, kirasautomobiloj, bone armitaj germanaj trupoj kaj helptrupoj de ukrainoj, litovoj kaj latvoj enmarŝis en Judan Urboparton. Sed renkontis ilin akra batalado. Oni bruligis kaj detruis domon post domo, sed la juda junularo aktive kontraŭstaris la ekzekutistojn, ĝi deziris almenaŭ morti kun honoro en la batalo anticipe malgajnita. Kontraŭ la moderna germana militmaŝino ekstaris la juda junulo kun benzinbotelo en la mano aŭ malbone farita fusilo. Ĝi estis malegala batalo, batalo por la honoro, en nomo de la murditaj de la hitlerismo, milionoj da viktimoj. Ĝi estis granda bataleksplozo en nomo „de nia kaj via libereco”, kiu pruvis al la mondo, ke oni povas kaj oni devas batali kontraŭ la germana invadinto. (I. Dratwer en Internacia Kulturo, Julio 1948.)

SCIIGOJ

Pravě vyšlé číslo »Osvětové práce«, týdeníku pro osvětové pracovníky (č. 1 z 11. ledna 1949) přináší tento výnos ministerstva informací a osvěty:

Spolupráce čs. esperantistů s osvětovými radami.

Spaz esperantistů se přihlásil do práce jako jedna z nejdůležitějších složek, která může s úspěchem působit nejen uvnitř při budovatelském úsilí státu a zpevňování jeho lidově demokratického řádu, nýbrž především navněk při jeho propagační a popularizační daleko za hranicemi.

Ministerstvo informací a osvěty ukládá proto krajským, okresním a místním radám osvětovým, aby vešly ve styk s orgány čs. esperantistů a zahájily účinnou spolupráci.

Jako naléhavý úkol jeví se tu především zprostředkování styku a vzbuzení zájmu o esperanto mezi dělnictvem. V té věci dobře poslouží naše veř. lidové osvětové školy, jejichž organizační statut uvádí esperanto jako vyučovací předmět v odstavci jazykových kursů.

O výsledcích této i další spolupráce buďtež oddělení VII/2 podávány pravidelné zprávy.

*

Ukládáme všem svým pobočkám, klubům, krajským a okresním důvěrníkům, aby ihned zahájili jednání s osvětovými radami ve smyslu tohoto výnosu.

Výbor Svazu.

Kongreso en Bournemouth. Ĉe la solena inaŭguro oni rajtos saluti en la nomo de registaro nur se la Loka Kongresa Komitato estos antaŭe ricevinta oficialan informon de la koncerna registaro. — Landaj Asocioj devas informi ĝin pri la nomo de tiu, kiu salutos la kongreson en ĝia nomo, antaŭ la fino de la Junio. — Kongresanoj, portantaj la kongresan insignon, rajtos uzi la urbajn omnibusojn senpage. — Somera lernejo estos aranĝita de la Societo de Britaj Esperantistaj Geinstruistoj tuj post la kongreso de la 13-a ĝis 20-a de Aŭgusto en Bletchley, Bucks., je unu-hora vagonarveturo de Londono. Nur lernejoj geinstruistoj rajtos partopreni ĝin. — Adreso por leteroj: 34-a Universala Kongreso de Esperanto, Herongate, Rickmansworth, Herts, Anglujo.

Ĉiujn aferojn koncernantajn la kongreson por nia lando prizorgas, komisiite de nia Centra Komitato, s-o Josef Víttek, c/o J. Bušta, Zderaz 3, Praha II. Por esti rekomenditaj al ricevo de elirvizo estos pritraktataj ekskluzive tiuj, kiuj estis anoj de la ideologia seminario kaj kiuj estras bone la lingvon. Ĉiuj informoj aperos ĝustatempe en nia gazeto, tial ne petu pri ili individue. Nombro de kongresontoj el Ĉeĥoslovakio ne estas ankoraŭ fiksita.

Ekzamena komisiono kunsidos la 2-an de Aprilo en Brno, por faciligi al samideanoj el Moravia ĉefurbo kaj el la ĉirkaŭaĵo prezenti sin al ekzameno. Aliĝojn sendu al s-o sekretario de la Komisiono JUDr. Tomáš Pumpr en Praha XIX, Verdunská 8.

Esperanto kaj lernejo. La Lerneja komisiono urĝe bezonas fidindan liston de instruistoj kapablaj instrui Esperanton en lernejoj. Tial mi insiste petas ĉiujn profesiajn instruistojn (profesorojn) kaj Esperanto-instruistojn respondi sekvantan demandaron kaj sendi la respondon al mi. Vian respondon skribu ankoraŭ hodiaŭ, tuj..., morgaŭ vi jam forĝos. Bone konservu la sekvantajn demandarojn, eble vi ilin bezonos pli poste. Ĉe via respondo sufiĉas citi la numeron de la demando.

1. Nomo kaj familia nomo.
2. Profesio.

3. Preciza adreso.
4. Dato de naskiĝo.
5. Antaŭ kiu ekzamena komisiono vi faris la ekzamenon el Esperanto? (Ekzemple: ŝtata komisiono en Brno, aŭ komisiono de EAĈSR).
6. Dato de via priesperanta atesto.
7. Eventualaj rimarkoj.

La Lerneja Komisiono krome bezonas fidindan statistikon de lernejoj, ĉe kiuj estas nunjare instruata Esperanto. En via raporto bonvolu respondi la jenajn demandojn:

1. Kie estas E. instruata: loko, distrikto, regiono.
2. Grado de lernejo kaj branĉo (ekz.: mezlernejo, komerca lernejo, supera komerca lernejo) kaj kiom da lernantoj kaj lernantinoj partoprenas la instruadon.
3. Kiom da lecionoj semajne kaj po kiom da minutoj.
4. Ĉu la instruado estas oficiala (en tiel nomataj „interes-rondeto“) aŭ neoficiala kaj kiu donis la permeson (ekz.: Distrikta Lerneja Komitato).
5. Sendu precizan kopion de la koncerna dekreto.
6. Nomo de la instruanto.
7. Eventualaj rimarkoj.

La nova Lerneja leĝo ebligas al ni oficiale enkonduki Esperanton en ĉiujn lernejojn. Precipe favoraj cirkonstancoj por ni estas ĉe la mezlernejoj (II-a grado). Ni do plene eluzu ilin. La propono (ne uzu la vorton „petaskribo = ŝadost“), kiun mi kunmetis laŭ konsilo de nia distrikta lerneja inspektoro, povas teksti jene:

Ĝeditelstvi strednŝ skoly v

Vĉc: Návřh na zřizenŝ zájmového kroužku esperanta.

Okresnímu školnímu výboru v

Žáci nařŝ školy projevíli znaĉný zájem o mezinárodní dorozumivací jazyk esperanto a proto podává ĝeditelstvi školy po dohodě s rodiĉi návrh na zřizenŝ zájmového kroužku esperanta.

Do kroužku se přihlásilo žáků a žákyň (celkem jich musí býti nejméně 15!) a vedl by jej N. N., který se dne podrobil před zkúšební komisŝ Svazu esperantistů v ĈSR (státnŝ zkúšební komisŝ v) písemně i ústní zkúšce z esperanta a byl prohlášen způsobilým k vyuĉování esperantu na středních školách.

V kroužku by se vyuĉovalo od t. r. dvakrát týdně po 1 hodině, a to (na př. v úterý a v pátek) odpoledne.

Ĝeditelstvi doufá v kladně vyřizenŝ svého návrhu.

V dne Podpis.

La direkcio de la lernejo povas kompreneble laŭplaĉe ŝanĝi la proponon, se la cirkonstancoj tion postulas.

Por ke nia laboro estu sukcesa, ĝi devas esti unueca kaj disciplina. Tial mi insiste petas, ke vi informu la Lernejan komisionon pri ĉiuj viaj planoj koncernantaj Esperanton kaj lernejon, precipe, kiam vi intencas direkti vian proponon al la ministerio por lernejoj. Nur tiam povos plenumi la Lerneja komisiono per konsilo kaj subteno, sian destinon. Th. Kilian, Třebiĉ, Přŝční 318.

Samideanoj, kiuj faris iun ekzamenon pri kapableco instrui Esperanton ĉu antaŭ ŝtata komisiono ĉu antaŭ komisiono de la Asocio aŭ alia institucio kaj volas esti en nomaro, kiun pri instruistoj de Esperanto starigas nia Lingva komisiono, bonvolu anonci sian nomon, naskiĝdaton, profesion, adreson kaj daton de la ekzameno al nia Lingva Komisiono (Dr A. Pitlík, Křemencová 21, Praha II).

Labor-grupo de Skolta Esperantista Ligo en Praha: Agento de SEL: St. Leřinger, Praha-Pankrác, Libuřina 34. Sekretario: Jarosl. Nedvěd-Jaron, Klimentská 24, Praha II. Kasisto: Zdeněk Kricner. Reprezentanto de Esperantofako de Junák: Frant. Buhr, Břevnov 514, Praha XVIII.

Tutmonda Interŝanĝa Adresaro, kiun eldonadis František Buhr en Praha-Břevnov 514, ĉesis aperadi, ĉar plua aperado de Adresaroj ne estas permesita por ŝpari paperon. La lasta numero (la 8-a) aperis en Aprilo 1948 kun 88 adresoj. La pluaj adresoj de fremdlandaj esperantistoj dezirantaj korespondi aŭ interŝanĝi diversajn objektojn, aperados en nia revuo en rubriko Korespondi deziras, kiun s-o Fr. Buhr ĝvidos.

Kotizo de SAT por 1949 estas 45 Kĉs. SAT-peranto estas k-do Fr. Kalný, Libuřinská 229, Plzeň 15.

ESPERANTISTA VIVO

Mortis la 1-an de Nov. Ladislav Pravenec, poŝta kontroloro pens., rusa legiano, unu el la fondintoj de EK en Praha VIII, multjara membro de UEA.

Mortis la 11-an de Decembro post longa malsano en urba malsanulejo de Albrechtice nia membro Jaroslav Mrázek.

Iliaj familianoj akceptu esprimon de nia profunda kondolenco!

Edziĝis. — Miroslav Šafránek, estinta prez. de EK Trutnov, kaj Maruška Drahekoupilová el Kánin la 7-an de Novembro en Praha.

Edziĝis. — Jarka Dittrich, iam en Dubrovnik, nun en Lanškroun, kaj Anežka Pazderová el Sviny la 4-an de Decembro.

Edziĝo. — La 7-an de Decembro okazis en Plzeň gediĝo de Anna Tomášková, oficistino el Plzeň kaj Cili Blomberg, urba oficisto el Svedujo. La ceremonio okazis laŭ protestanta rito, la vortojn de paroŝestro Machotka tradukis en Esperanton nia membro L. Svoboda, sekretario de la Okcidentbohemiaj esperantistoj. La gesamideanoj konatiĝis per nelonga interkorespondado kaj ilia familia lingvo estos Esperanto, ĉar ili parolas krome sole siajn lingvojn ĝepatrajn. (K.)

Ĉiuj tri junaj paroj ricevu de ni plej sincerajn kaj varmajn bondezirojn!

Honorigo. — Vilibald Scheiber, kapelestro kaj komponisto, estis nomita profesoro de konservatorio en Brno kaj lektoro en Akademio de Muzaj Artoj en Brno. Gratulon!



Malnovaj numeroj de „Esperantista“ serĉataj! 1946: nroj 4, 7, 8, 9, 10, 1947: 1, 2, 6. Kiu posedas kaj ne bezonas iun el tiuj numeroj, bonvolu ĝin al ni resendi kontraŭ rekompenco. Bonvolu adresi: Esperanto-Asocio en CSR (por JRP/G), poŝt. schr. 7075, Praha XIX/7.

La Juna Vivo, la bona gazeto por junaj esperantistoj, estos havebla en nia lando. Abono por 1949 kostas 47 Kčs, kiujn pagu al František Mašek, Tř. pres. Kl. Gottwalda 17, Karlovy Vary, poŝtsparkasa kto nro 2331. Malgranda eldono por infano sub 14 jaroj kostas 19 Kčs jare, se estas sendataj pluraj ekz. al unu adresu. Pri La Juna Vivo bv. korespondi senpere kun Fr. Mašek laŭ supra adreso.

KORESPONDI DEZIRAS

S-ro A. De Boeuf, 10. Drift. 1. Coq-sur-Mer. Belgujo. Deziras P. M. (200/500) diversaj (ĉiam rekomenditaj sendaĵoj), P. K. (sed kun p. m. bildflanke).

S-ro Ramon Vila Catllá, Guimerá 45, 1, 2. Manresa. Barcelona. Hispanujo. Interŝanĝas poŝtmarkojn.

S-ro José Tuset, Apartado 70, Manresa. Barcelona. Hispanujo. Interŝanĝas poŝtkartojn kun ĉiuj landoj.

S-ro Johano Brandt, Tesselschade staato 49. Haarlemo. Nederlando. Interŝanĝas poŝtmarkojn.

Pri skoltmovado, filmoj kaj fotografajoj korespondos s-ro Stefan Kajdas, Wadowice - Kr. Pl. Kościuszki 16. Polujo.

S-ro D-ro Isamu Yamaga, Hanazono-tyō Higasi 3, Otaru-Si, Japanujo, deziras speciale korespondi pri oftalmologio kaj pri historio de eŭropaj universitatoj.

S-ro Hugo A. Lingva, La Paz 1032, Rosario, Respubliko Argentina, interŝanĝas poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn.

S-ro Folkert Bylard, Sooberg 18. Bussum, Nederlando. Ĉiam respondos.

S-ro B. J. M. Walker, Ternatestraat 49. Haarlem. Nederlando. Ĉiam nepre respondos.

F-ino Dolores Godoy, Colón 18. Figueras (Gerona) Hispanujo. Respondo certa.

Kuanchi-Li, 2 Hungren Li, (1) Kweivang Road, Tientsin, ĉina samideano, dez. intŝ. poŝtm. Preferas neuzitajn pm. de Protektorato en kompletaj serioj.

Korespondi kaj intŝ. pm. deziras:

Hwa Lung Trading Co., Room 202, Yu Feng Building, Liao Ning Road, Tientsin.

Neitsun Chang, 261 Shansi Road, Tientsin.

Letní kolej esperanta v Doksech

(Somera kolegio de Esperanto en Doksy)

16.—30. VII. 1949

I. zpráva:

Místní rada osvětová v D. uspořádá v rámci svého kulturně-propagačního programu za spolupráce místního esper. klubu a členů komitétu loňské »III. letní školy esperanta« ve dnech 16. až 30. července t. r. řadu kursů (základní, pokračovací, konverzační, seminář literární a historický) a zvláštní »cvičný« kurs pro učitele esperanta Csehovou metodou jakož i cyklus esperantských přednášek z esperantologie a esperantismu, jež prosloví přední čs. esperantští jazykoví odborníci a pionýři. Mimo to opět bude uskutečněn oblíbený kurs umění řečnického.

Sledujte bližší zprávy v příštích číslech „Esperantisty“!

Letní kolej esperanta
(Doksy u M. j. č. 453)

La komitato de EAĈSR, redakcio de „Esperantista“ kaj la Librovendejo de la Asocio dankas plej kore por la alvenintaj multnombraj gratuloj novjaraj. Ili estas sincere reciprokataj.

Titulní list a obsah třetího ročníku je přiložen k tomuto číslu. Je z něho patrno, kolik materiálu bylo do listu sneseno přes zmenšený rozsah. Velmi doporučujeme čtenářům, aby si ročník uchovali tím, že ho dají svázat. Ale zvláště prosíme knihovníky všech našich místních organizací, aby dbali, aby svázaný ročník byl uložen v jejich klubovní knihovně.

LITERATURA MONDO

Esperanto ne povas vivi sen literaturo. Subtenu ĝin abonante tiun ĉi revuon, en kiu vi trovos ĉiujn famajn nomojn el la mondo de niaj verkistoj. Abono Kčs 150.— pagebla al Librovendejo de EAĈSR.

INTERNACIA KULTURO

La bela revuo de danublandaj esperantistoj. Riĉe ilustrita. — Jaran abonon Kčs 100.— pagu al Librovendejo de EAĈSR.

MALGRANDA REVUO

Revuo valora por ĉiu serioza esperantisto, eldonata kvaronjare de Stellan Engholm, Ludvika (Svedujo). Nia Librovendejo akceptos kelkajn — nemultajn — abonojn por 1949. Interesiĝantoj sendu tuj abonpagon Kčs 56.— al pŝp. kto 12.371 de nia Librovendejo.

Sbírejte starý papír!

Posloužte tím hospodářství své vlasti, — Oznamte nám, s potvrzením místního odběratele, kolik jste odevzdali ze svého sběru. — Přiložíme to k své žádosti o větší přiděl papíru pro náš list. — Budeme mítí zase 12 stran, bude-li váš sběr úspěšný.